

BONA


ESPERO

volumo: 1983

eldonas: sudafrika esperanto-asocio

numero: 3

ISSN 0006-7024



BONA ESPERO

Revuo de la Sudafrika Esperanto-Asocio (SEA)
ISSN 0006-7024

Redaktoro: J.J. Zeelie
Sub-Redaktoro: A.K. Fouché

Tiu ĉi revuo trimonata aperas en Marto, Junio, Septembro kaj Decembro ĉiujare.

La redakcio ricevas nur maŝinskribitajn kontribuaĵojn. Manuskriptoj ne publikigitaj ne resendiĝos. La limdato por la venonta numero estas la 15-a de la monato antaŭ ties apero.

Redakcia adreso: P.O. Box 12271
Centrahill
Port Elizabeth
6000

Prezo: Membroj de SEA - Senpage. (Jara membreco de SEA kostas R6.00) Ekstraj ekzempleroj po R2.00

Nemembroj - Jarabono (4 eldonoj) kostas R7.00
Unuopaj ekzempleroj po R2.00

Kopioj de artikoloj estas haveblaj po 20c por ĉiu paĝo.

Abonu/Aĉetu pere de la SEA kasisto:

P.O. Box 1227
Cape Town
8000

Estraro de SEA: Prezidanto - E. de Kock
Vic-Prezidanto - A. von Blottnitz
Sekretario - O. Sher
Kasisto - C.S. Beckford
Komitatanoj - H.J. Appel, A.K. Fouché,
J. Hammes, F.M. Woolf

<i>Rivaleco Inter Volapuko Kaj Esperanto</i>	1
<i>Kia Esperantisto Vi Estas?</i>	3
<i>El La Poezio</i>	6
<i>Magistra Disertacio Ĉe Wits Universitato</i>	7
<i>Recenzoj</i>	8
<i>Novaj Libroj</i>	9
<i>UEA: Libroservo</i>	10
<i>Ĉu Vi Scias, Ke....</i>	11
<i>Fidetu</i>	12
<i>Angulo Por Korespondemuloj</i>	14
<i>Anoncoj</i>	14
<i>Adresaro</i>	14

KOVRILLO: La ĝardeno flanko de la Domo de UEA en Rotterdam (kiel ĝi aspektos post la planata rekonstruo). Ĉar la strata fasado en la domo larĝas nur iom pli ol sep metrojn, multaj ne konscias, ke la konstruaĵo etendiĝas en la ĝardenon ĝis plenaj dudek metroj. Post la rekonstruo la longo de la oficeja spaco en la teretaĝo atingos tridek metrojn.

RIVALECO INTER VOLAPUKO KAJ ESPERANTO

En 1979 okazis la centjara datreveno de la kreo de la internacia lingvo Volapuko fare de Johann Martin Schleyer, romkatolika pastro oficanta en Badenlando, Germanio. Lia planlingvo estis sola en la 19-a jarcento, kiu atingis praktikan tutmondan sukceson antaŭ la disvastiĝo de Esperanto.

Kiu konas la verkojn de Zamenhof, scias, ke li estis devigata okupiĝi pri Volapuko, ĉar, dum la unuaj jaroj de la ekzisto de Esperanto, tiu lingvo ludis la rolon de rivalo kaj minacis malhelpi la kreskon de la Esperantomovado. La nomo Volapük, kiun Schleyer donis al sia lingvo, estas kunmetita per vol kaj pük, modifitaj formoj de la anglaj vortoj world kaj speak (mondo kaj paroli). Volapuko, do, signifas "mondlingvo". Verŝajne reagante kontraŭ la troa pretendemo de sia konkuranto, Zamenhof aperigis jenan moton sur la titolpaĝo de la "Unua Libro": "por, ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia."

La ĉefa kontraŭvolapuka propaganda verko de Zamenhof estas la nefinita traktaĵo ESPERANTO KAJ VOLAPÜK, kiu aperis en LA ESPERANTISTO en kvar partoj en la jaroj 1889 - 1890. En tiu artikolserio Zamenhof reliefigis la difektojn de la ŝlejera lingvo. Kvankam la daŭrigo estis promesita en 1890, ĝi neniam estis publikigita, ĉar Zamenhof jam konstatis, ke Volapuko estas destinita formalaperi pro interna sinteno de Schleyer, kiu ne donis al sia lingvo eblon nature evolui.

En sia dua traktaĵo tuŝanta Volapukon, ESENCO KAJ ESTONTECO DE LA IDEO DE INTERNACIA LINGVO (1900), Zamenhof komparis Esperanton kun Volapuko por montri la superajn kvalitojn de sia lingvo. Kiam Esperanto jam estis ekster danĝero, Zamenhof eĉ povis laŭdi "la tre estimindan sinjoron Johann Martin Schleyer." En sia parolado ĉe la Unua Universala Kongreso en 1905, li esprimis koran dankon en la nomo de la kongresanoj al

"la unua kaj plej energia pioniro de la ideo de neŭtrala lingvo internacia."

Grava spekulativa demando estas: kiam Zamenhof la unuan fojon informiĝis pri Volapuko? En artikolo publikigita en 1979 Bernhard Golden hipotezis surbaze de kronologia analizo de la evoluo de ambaŭ lingvoj, ke Zamenhof akiris ekzempleron de la unua eldono de la volapuka gramatiko de Schleyer nelonge post ĝia publikigo en Germanio en 1880. Dum sekvaj jaroj la aŭtoro de Esperanto profunde studis tiun lingvon; la supremenciitaj verkoj atestas, ke lia scio pri Volapuko tute ne estis supraĵa. Ankaŭ en la jaroj post la lanĉo de Esperanto en 1887, la enhavo de pluraj prelegoj kaj leteroj de Zamenhof rivelas, ke li atente sekvis la malprogreson kaj dekadencan de la lingvo de Schleyer kaj ĝia movado.

Bernhard Golden, Kontakto: 75 (1982/3)

koncize

dumonata gazeto por la junularo

KOMUNA BULTENO DE TEJO KAJ DE ĜIAJ LANDAJ SEKCIOJ
brita — flandra — franca — germana — itala — nederlanda



MAJSTRO EN NOV-JORKO

KIA ESPERANTISTO VI ESTAS?

BONAN-TAGON-ESPERANTISTOJ: Ilia vortprovizo estas tro limigita. Kelkajn esprimojn ili bonege scias, ekz.... bonan tagon, kiel vi fartas?, ĝis revido ktp. Cetere ili ĉiam parolas nur nacilingve. Tre ofte ili portas tre grandan verdan stelon.

ETERNE NOVAJ ESPERANTISTOJ: Dum pli ol jardekoj ili jam studas la Internacian Lingvon, sed ili malmulte progresas. Kiam aliaj esperantistoj alparolas ilin, ili ruĝiĝas kaj ne scias respondi. Ĝenerale ili tre flue parolas nacian lingvon en Esperanto-kunvenoj.

FILATELIST-ESPERANTISTOJ: Ili volonte korespondas kun ĉiuj landoj, sed nur por interŝanĝi poŝtmarkojn. Cetere ili ne partoprenas esperantistan vivon.

VORTAR-ESPERANTISTOJ AŬ PROMENANTAJ VORTAROJ kontraŭe scias multege da Esperanto-vortoj, precipe tiujn, kiujn oni preskaŭ neniam bezonas. Sed en interparolo kun aliaj ili mallerte balbutas; ili neniam legas libron (krom vortaron) kaj ne ŝatas korespondi.

GAZET-ESPERANTISTOJ opinias, ke ĉiu, kiu pli-malpli scipovas Esperanton, havas taskon verki gazetartikolojn. Tiu kategorio senesperigas verajn redaktorojn. Iliaj plumfruktoj ne bongustas. Verkado postulas apartan talenton.

KLUB-ESPERANTISTOJ loĝas precipe en grandaj urboj, kie la verda movado floras. Ili regule vizitas la kunvenojn en propra klubo, sed tute ne interesiĝas pri la distrika, pri la landa aŭ internacia movado, pri kongresoj.

KONGRES-ESPERANTISTOJ plejparte estas fraŭloj (ambaŭseksaj) loĝantaj izolite en malgrandaj lokoj. Ili havas amikojn en ĉiuj urboj, kie jam okazis internaciaj kongresoj. Sed en propra loko, urbeto aŭ vilaĝo ili estas

* ESPERANTO OPENS THE DOORS TO THE REST OF THE *
 WORLD - - - IMPROVE YOUR OWN ABILITY NOW *

KORESPONDKURSOJ
 . . .
 GVIDATAJ DE SEA

LERNU ESPERANTON HODIAŬ
 LEER ESPERANTO VANDAG
 LEARN ESPERANTO TODAY

Elementa	Kurso
Mezgrada	Kurso
Altgrada	Kurso

KONTAKTU SEA
 VIDU ADRESARON
 SUR PAĜO 15



'Ankaŭ mi ne volis
 malfermi la por-
 dojn al interna-
 ciaj riĉoj.....'

kaj daŭre restos la sola esperantisto.

GRAMATIK-ESPERANTISTOJ fervore studas la teorion flankon de nia lingvo. Pri la plej subtilaj gramatikaj demandoj ili scias la sole ĝustan respondon. Ve, kiu uzas la lingvon ne laŭ iliaj konsiloj. Ĉiam ili havas ruĝan krajonon en la mano.

NUR-ESPERANTISTOJ estas homoj, por kiu la Zamenhofa kreaĵo estas solĝusta vivocelo. Ili interesiĝas pri nenio alia. Neniam ili legas nacilingvan libron aŭ ĵurnalon. Ilia domo estas plena de esperantaĵoj. Ili portas verdan stelon, verdstelajn ringojn, manikbutonojn, poŝtranĉilon, krajonon, eĉ noktvestoj estas ornamitaj kvinpintstele. En ĉiu rondo ili parolas daŭre pri la Interlingvo, ĉiun ili salutas Esperantlingve. Ili estas la plej bonaj KONTRAŬ-PROPAGANDISTOJ de nia movado.

OPOZICI-ESPERANTISTOJ ŝatas aŭdi sin mem, sed oni mal multe povas diri, se oni samoprias kun la gvidantoj. Tial ili ĉiam estas kontraŭ la agoj de la plimulto. Ili amas fortajn, akrajn kvalifikojn kaj senfinajn lamentadojn. Se oni volas kredi al ili, ĉiuj aktivuloj en nia organizo estas trompantoj aŭ profitemuloj, aŭ diktatoroj.

KRITIKEMAJ ESPERANTISTOJ: Tiu kategorio daŭre observas, klasifikas kaj severe prijuĝas la samideanojn. Neniu taŭgas krom ili mem. La saĝa leganto verŝajne jam konstatis, ke la verkinto de ĉi tiuj linioj estas unu el la plej tipaj reprezentantoj de ĉi-lastata kategorio. Ĉu vi, leganto jam renkontis vian portreton? Aŭ ĉu vi apartenas al la 12-a kategorio?

LA ORDINARAJ ESPERANTISTOJ estas progresemaĵoj homoj, kiuj interesiĝas pri multaj aferoj, interalie ANKAŬ PRI ESPERANTO. Ili uzas la lingvon praktike kaj klopodas disvastigi ĝin. Por ili Esperanto estas bona rimedo por kontribui por reciproka ekkono de la popoloj por ilia amikiĝo, por konservo de la paco, por batalo kon-

servo de la tuthomara kulturo.

El Bulgara Esperantisto: 11/82

EL LA POEZIO

ESTAS MI ESPERANTISTO

Verda stelo sur la brusto
iom palas pro la rusto.
Mi ne estas purigisto;
estas mi esperantisto.

Kuŝas ie sub tegmento
"Netuŝebla Fundamento".
Tuŝu ĝin nur la Mefisto;
estas mi esperantisto.

Polkovrite sur bretaro
putras mia SAT-vortaro.
Tedas min la vorto-listo;
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas
kaj gazeton ne abonas...
Librojn legu la verkisto;
estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido:
"Bonan Tagon! Ĝis revido!"
Ĝi sufiĉas por ekzisto;
estas mi esperantisto.

Pionirojn mi kritikis,
la gvidantojn dorne pikas
kaj konspiras kun persisto;
estas mi esperantisto.

Por la venko mi esperas,
sed neniom mi oferas.
Mi ne estas ja bankisto;
estas mi esperantisto.

Se baraktas en la krizo
la movado, organizo,
helpas mi nur per rezisto;
estas mi esperantisto.

Flugas per facila vento
el la buŝo 'Nova Sento'.
Ĝi sufiĉas por sofisto;
estas mi esperantisto.

Post la mort' ĉe tomba mia
staros "rondo familia",
nekrologos ĵurnalisto:
estis li esperantisto.

(Poeto nekonata)

... ..

MAGISTRA DISERTACIO ĈE WITS UNIVERSITATO

Gaile Parkin ricevis la gradon Majstro pri Arto en la departemento de lingvistiko sub prof. Aldridge ĉe la Universitato de Witwatersrand por la 189-paĝa disertacio "The Linguistic Structure and Sociological Foundations of Some Major Auxiliary Languages".

La unuaj dudek paĝoj klasifikas la helplingvojn en:

- a. naturaj
- b. priori artefaritajn
- c. a posteriori artefaritajn
- d. en duonartefaritajn

RECENZOJ

JAPANESKOJ de Edwin de Kock

Preskaŭ koincide kun la Internacia Poezio-Tago atingis min JAPANESKOJ de Edwin de Kock, poemaro kiun li sendis al mi la 15.12.82, omaĝe al la Esperanta Libro-Tago kaj al nia multjara amikeco. Ĉar ĝia veno okazis en la sama tempo kiel mia printempa feriado, mi povis ĝin lante ĝui, lege kaj re-, pripense kaj medite. Kiel esprimon de mia ŝato kaj de mia tutkora danko al mia samideana amiko, mi volas vortumi kelkajn konsiderojn, kiujn la poemaro sugestis en mi.

Unue mi devas diri, ke JAPANESKOJ faras tuj klara kaj senduba poezian dirmanieron pli koncentritan kaj esprimivan ol tiu ĝenerale montrita en la unuaj poemaroj de E. de Kock. Nun la poeto preferas sugesti ol akumuli, t.e. li decide favoras koncizigi per malmultaj imagoj la poemkonsistan substancon. En liaj japaneskaj poemformoj estas pleje admirindaj la vervaj imagasocioj atingitaj per nekutimaj apudmetoj leksikonaj, kiujn la prologinto Nakamura nomas toriauase kaj kiujn okcidentuloj eble baptus sinestezioj (el la helena synaistkesis) aŭ alivorte, psiĥologiaj oksimoroj:

FANTOMOJ

Profundanokte,
en ĉambroj fremde miaj,
mi kontraŭstumblas
la ĉeeston estintan
de antaŭaj loĝantoj.

LIGNA MASKO

Kava konvekser.
Okuloj el nenio.
De malantaŭe
jarmila nul rigardas
la ombrojn senkonturajn.

Evolua kontinueco evidentas, same kiel simpleco de rimedoj kaj potencita pripensado. Ne gravas, ĉu meditado transformiĝas en imagojn, ĉar malantaŭ la imagoj

ĉiam staras la volo pri ordo kaj strukturo de la poezia penso; de poezia penso, kiu estas simbiozo inter racio kaj sensacioj. Mi opinias, ke ni troviĝas kvazaŭ antaŭ filozofia teksto, kie integriĝas racio kaj sentaĵoj kiel krudaj materialoj de la poemoj.

E. de Kock aperas en Esperantujo kiel unu el la plej firmaj voloĵ hejmigi en nia originala beletro deduktan kaj konscian raciecon de la poezia penso. Aldone li alportas filozofian kaj sciencan kulturojn kunfigurantajn freŝan mensan kartografion kaj ĉi ties reference sugestan kunsignifaron, kiuj, ne estante kutimuzaj, apertas novan espriman kaj eksperimentan vojon.

Prof. d-ro Juan Régulo Pérez.
La Laguna: 04.04.83.

NOVAJ LIBROJ

UNIVERSITATA LERNOLIBRO DE ESPERANTO

Aprobata de Kontrol-Komisiono de Lernolibroj UEA. UEA.

ESPERANTO IN THE MODERN WORLD

Studoj kaj artikoloj pri lingvaj problemoj, la rajto je komunikado kaj la Internacia Lingvo. Esperanto Press, Bailieboro, Ontario, Kanado, KOL 1B0.

JAPANESKOJ

Poemaro de Edwin de Kock (vidu recenzon). Sudafrika Esperanto Asocio, 75 Bronkhorst Street, Groenkloof 0181.

IZOLO

Poemaro de K. Kalocsay. UEA.

LA LINGVA ESENCO DE ESPERANTO

Esperantologio de A. Atanasov. UEA.

U.E.A.: LIBROSERVO

La listo de la pleje vendataj libroj aperis:

Plena Analiza Vortaro: Kalocksay kaj Waringhien
 Plena Ilustrita Gramatiko: Waringhien k.a.
 Ĉu li venis trakosme?: Valano
 Esperanto en Perspektivo: Lapenna, Lins kaj Carlevaro
 Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto: Wells
 La Luzidoj: Camões
 Praktika Bildvortaro de Esperanto: Watts
 Lidja Zamenhof: Dratwer
 Esperanto and English Dictionary: Wells
 Kiel diri....?: Lentaigne
 Joĉjo, La Amiketo: Otto
 Fabelo de la Verda Pigo: Beaucaire
 A B Z de Amo: Hegeler
 La Sankta Biblio
 1887 kaj la sekvo.... Eseoj IV: Waringhien
 Plena Vortaro: Grosjean-Maupin k.a.
 Enciklopedio de Esperanto
 Lingvaj Ludoj de G. E. J.
 Paŝoj al Plena Posedo: Auld
 Per Nia Nura Vol': Kastejviva k.a. (kaseto)
 Plena Verkaro de Zamenhof (10 volumoj)
 Dôna Bârbara: Gallegos
 Mondo de Travivaĵoj: Sekeli
 Primico: Tagor
 Baza Literatura Krestomatio: Benczik
 Somermeze: Kuusberg

La plej nova katalogo aperos ĉi tiun jaron kaj estos havebla de U.E.A.

... ..

ĈU VI SCIAS, KE.....

- : La malpli granda luno de la planedo Marso estas samgranda kiel ŝtonego. Diametre ne pli granda ol $8\frac{1}{2}$ mejloj, ĝi mezuriĝas preskaŭ $\frac{2}{3}$ la longecon de la insulo de Manhattan.
- : La mezgranda meteoro, kvankam brilega sur la noktoĉielo, estas ne pli granda ol sablero. Eĉ la plej grandaj malofte mezuriĝas pli ol la dimensioj de pizo.
- : La termaraj akvoj sufiĉas plenigi tubon 75 mejlojn longakaj 70 000 mejlojn altan, t.e. $\frac{1}{3}$ la distancon ĝis la luno.
- : La Eiffel Turo, konstruita de 250 laborantoj, konsistas el $2\frac{1}{2}$ milionoj da vinktotruoj kaj 8000 tunoj da ŝtalo. La planoj bezonis 14 000 kvadratfutojn da papero - $\frac{1}{3}$ la grandecon de ordinara futballedejo.
- : Malgraŭ la rapidega kirliĝado de turnadoj, ili ofte moviĝas antaŭen je 5 mejloj ĉiuhore.

ĈU VI ŜANĜIS VIAN ADRESON ?

BONVOLE SCIIGU LA
REDAKCION SEN PROKRASTO

!!!

RIDETULa roboj de Manjo

Estimata psikiatro, mi venis pro mia edzino Manjo. Imagu, ŝi lastatempe havas la manion, ke iu volas ŝiajn robojn ŝteli.

Ĉu vi vere konvinkiĝis pri tio?

Eĉ ŝia manio kreskis jam tiagrade, ke ŝi dungis spertan garderobiston por gardi la robojn. Hieraŭ mi malkovris lin en la ŝranko.

Vera kamaradeco

Tio montriĝas kiam la maristo, aŭdante krion, ke homo falis en la maron, tuj subigas la flagon ĝis la masto-mezo.

Fremdiĝo

Mia edzineto ŝajnas nuntempe tiel fremda al mi! Kaj mi estas bona kaj brava edzo, kiu ne kutimas kisi fremdan virinon.....



"A, Bo, Tso....."



La fiera patrino: "Oni diras, ke mia bebo tre similas al mi."

Amikino: "Nu, ne malĝoju! Tio ne gravas, se nur la ido estas sana."

Patrino: "Montru al mi vian langon."

Knabo: "Neniam! Kiam mi faris tion al la instruisto, li min batis."

ANGULO POR KORESPONDEMULOJ

Maria Costa, 21-jara fraŭlino katolika komencis lerni la verdstelan lingvon. Ŝia adreso estas: Sebastiao Dias Soares 34, Bairro Sao José, Montes Claros MG 39400, Brasilio.

ANONCOJ

:La komitato de la Sudafrika Esperanto-Asocio kaj ĉiuj ties membroj elkore dankas s-ro Felix Woolf pro lia senlaca laboro kiel redaktoro de Bona Espero. Post 18 jaroj s-ro Woolf decidis rezigni redaktorecon. La nova redaktoro estas s-ro Cobus Zeelie ĉe -

BONA ESPERO
P.O. Box 12271
Centrahill
PORT ELIZABETH
6000

:Oni aprobis la statuton de la Esperanto-grupo ĉe la Pretoria Universitato en majo, 1983. La nomo de la grupo estas ESPERANTO TUKS, kaj ĝi jam havas dek membrojn.

:La sudafrika Esperanto-kongreso okazos en 1987 en la randareo. Sendu viajn ideojn al SEA.

:SEA klopodas aranĝi rondvojaĝon, eble al la Kruger Parko, por fremdlandaj esperantistoj, pere de vaporlokomotivo. La asocio petas helpon de membroj, kiuj volonte agos kiel ĉiĉeronoj.

ADRESARO

- :Sudafrika Esperanto-Asocio (SEA)
 Bronkhorststraat 75
 Groenkloof
 PRETORIA
 0181
- :Bona Espero (Revuo de SEA)
 Posbus 12271
 Centrahill
 PORT ELIZABETH
 6000
- :Port-Elizabeta Esperanto-Klubo (PEK)
 Astoriahof 6
 Marine Rylaan
 Somerstrand
 PORT ELIZABETH
 6001
- :Johannesburga Esperanto-Societo (JES)
 St. Michaelsweg 8
 New Redruth
 ALBERTON
 1450
- :Pretoria Universitata Esperanto-Klubo
 Manskoshuis Olienhout A 214
 Lynnwoodweg, Hoër Pienaarstraat
 PRETORIA
 0002
- :Esperanto-PUK
 Tomstraat 51
 POTCHEFSTROOM
 2520
- :Kaburba Esperanto-Rondo
 Posbus 18
 Seepunt
 KAAPSTAD
 8000

(Magistra Disertacio, de p. 7)

Sekvas 34 paĝoj pri la historio de 115 movadoj pri internaciaj lingvoj.

Ok de tiuj estas pli profunde ekzamenitaj en la tria ĉapitro. La honoron dividas kun Esperanto la jenaj:

Ido, Volapük, Frato, Latino sen Flexione, Novial, Interlingua kaj Occidental samspace. Sekvas tra 34 paĝoj pritraktado de komunaĵoj lingvistikaj inter tiuj lingvoj. Sekvas tion tuta ĉapitro pri la Angla kiel mondhelpingvo.

La lasta ĉapitro de 38 paĝoj temas pri sociologiaj aspektoj, kaj Esperanto ricevas elstaran gravecon, eĉ favoran pritrakton, malgraŭ tio, ke en la komenco F-ino Parkin promesas al si favori nenium projekton.

Dum la du kaj duona jaroj de ŝia aŭtorado ŝi respondis al neniun kontakto fare de la Johannesburgaj Esperantistoj, sed prof. Aldridge akiris "Esperanto en Perspektivo"-n.

F-ino Parkin havigis al si informojn de kelkaj naciaj Esperanto-Asocioj perletere. Ŝi estas nun instruisto de la Angla en Bophutatswana kaj antaŭe estis gvidanto de la "Soweto Project" por helpi al plua posedo de la Angla. Nek ŝi, nek prof. Aldridge lernis Esperanton, sed ili estas sufiĉbone informitaj por meriti la ricevon de ĉiuj plue-aperontaj informiloj. Prof. Aldridge esperas iam starigi la unuan departementon pri interlingvistiko en Sudafriko.

ŜANGĜO DE ADRESO!

Bonvolu kompletigi kaj resendi al:

La Redaktoro, BONA ESPERO, P.O. Box 12271,
Centrahill, PORT ELIZABETH, 6000

NOMO:

ANTAŬA ADRESO:

.....

.....

.....

NOVA ADRESO:

.....

.....

.....

SUBSKRIBO:

Eltranĉu

ESPERANTO




**IN THE MODERN WORLD
EN LA MODERNA MONDO**

Studies and articles on language problems,
the Right to Communicate,
and the International Language.

Studoj kaj artikoloj pri lingvaj problemoj
la Rajto je Komunikado,
kaj la Internacia Lingvo.

esperanto press

**sciencaj
komunikaĵoj**



ELDONAJO DE LA SCIENCA ELDONCENTRO DE UEA

La Libroservo de UEA

disponas pri kelkdeko da ekzempleroj de la baza bibliotekista manlibro

KLASIFO DE ESPERANTAJ TEMOJ de M.C. Butler

La 144-paĝa verko aperis en 1950 kaj delonge ne plu estis akirebla en la merkato.

Prezo: 30,00 (por Nederlando 31,20) gld., plus sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

ESPERANTO



IN THE MIDDLE WORLD
IN THE MIDDLE WORLD



ISSN 0006-7024

SUD-AFRIKO SEA